

# ESPERANTO\*INFO

\*Informilo de Kataluna Esperanto-Asocio

La 8-paĝa informilo kiun vi havas ĉemane, celas raporti, tre resume, la agadon de Kataluna Esperanto-Asocio dum la jaro 2014, kiu estas daŭre kreskanta malgraŭ la malbonega ekonomia situacio de la asocio. Sed kion mono ne atingas, tion sukcese plenumas tiuj kiuj ŝtelas tempon al la familioj, al la dormo kaj eĉ al la laboro. Al tiuj mi volas transdoni mian plej elkoran dankon. Ĉar ili tute sindone kunpedalas, kaj tial nia biciklo daŭre stare veturas.

Sed endas danki fervore, tiujn kiuj finance helpas nian agadon. Aparte ni danku la donacintojn, la donacantojn kaj la donacontojn en la amasfinancada kampanjo por renovigi la Biblioteko-Arĥivon Petro Nuez (BAPN). Limdato estas la 19a de januaro. Se tiam ni ne sukcesas plenumi la celatajn 6000-eŭrojn, la tuta projekto fiaskos. Estas tre grava afero, do, kontribui kaj instigi onin kontribui. *Bapn*-u kun ni!

Ferriol Macip

## ESPERANTO\* CAT

\*Associació Catalana d'Esperanto  
Kataluna Esperanto-Asocio

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Kotizoj por la jaro 2014-2015:  
individua abonanta membro, 64 eŭroj;  
pensuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta membro, 128 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Enginyers,  
Agència 001, Barcelona  
Kontonumero: 3025 0001 15 1433398158  
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158  
UEA-konto: kaea-b  
CIF: G-58338567

Plenumkomitato:  
Prezidanto: Josep Franquesa;  
sekretarioj: Xavier Alcalde kaj Gemma Armadans; vicprezidanto: Carles Vela;  
kasisto: Sebastià Ribes; voĉdonantoj:  
Àngels del Pozo, Llibert Puig, Montserrat Franquesa kaj Ramon Perera.

Apartat/Poŝtkesto 1008  
08200 Sabadell (Vallès Occidental),  
Països Catalans/Kataluna Landaro  
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633  
Ret-adreso: info@esperanto.cat  
Ret-paĝo: www.esperanto.cat

## AMASFINANCADA KAMPANJO POR RENOVIGI LA BIBLIOTEKO-ARĤIVON PETRO NUEZ (BAPN)



Aktuala stato de la BAPN.

Kataluna Esperanto-Asocio (KEA) lanĉis amasfinancadan kampanjon por renovigi la Biblioteko-Arĥivon Petro Nuez (BAPN), kiu enhavas gravajn historiajn dokumentojn de antaŭ pli ol 100 jaroj. Ĝi urĝe bezonas restrukturigon, por protekti tiun gravan parton de la historio de Esperanto en Katalunio.

En la unua fazo de la kampanjo oni celas atingi 6000 eŭrojn por renovigi la plankon de la ejo kaj starigi kvar bibliotekajn bretarojn. En estonta dua fazo, la kampanjo celas kolekti pliajn 4000 eŭrojn por aldoni du pliajn bretarojn, tablon kaj seĝon novajn kaj la komputilaĵojn necesajn por katalogi la enhavon de la BAPN, kiu estos parto de la naskiĝanta tutmonda katalogo de esperanto-bibliotekoj.

Biblioteko Arkivo Petro Nuez (BAPN) estas biblioteko-arĥivo de Kataluna Esperanto-Asocio registrita en la reto de fakaj bibliotekoj de la registaro de Katalunio.

La kampanjo estas en la retejo Verkami, la pionira amasfinancada interretejo de Katalunio, kies nomo venas de la esperantaj vortoj „verki” kaj „ami”.

**Kontribuoj tuj devas veni  
antaŭ la 19a de januaro  
pere de la retejo  
<http://vkm.is/bapn>**

La proponataj rekomencoj por la donacoj povas esti simpla danko kaj invito al inaŭguro, publikigo de la nomo en ŝildo sur la muro de la ejo, sed oni ankaŭ proponas vespermanĝojn, gastigadojn, ĉiĉeronadojn, kulturajn profesiajn vizitojn en Esperanto, kvalitajn artajn bierojn kun esperanta nomo, ekzemplerojn de *La Eta Princo*, *Asteriks*, aŭ la lastajn eldonajn novaĵojn de la kataluna asocio, kursojn, t-ĉemizojn, diskojn kaj eĉ koncertojn de Kaj Tiel Plu. La plej donemajn mecenojn eĉ honorigos la Katalunaj Kongresoj de Esperanto.

## NOVA RETEJO DE BIBLIOTEKO MOLERA

Esperanto-Biblioteko Ramon Molera Pedrals en urbeto Moià havas ekde la pasinta januaro renovigitan kaj enhavplenan retejon trilingvan.

La paĝaro celas esti vigla kaj diskonigi al esperantistoj tutmondaj kun la enhavo de la bibliotekaj bretaroj. Iom post iom, Biblioteko Molera skanados kaj alŝutos specimenajn numerojn el sia gazetaro, la ĉefa parto de la kolekto kunigita de Ramon Molera (1922-1983) kaj daŭrigata de lia filino Ana María.

Nu, por esti informita pri la novaj aldonoj oni povas sekvi Bibliotekon Moleran en sociaj retejoj Facebook kaj Twitter.

## ĜIS LA REVIDO DARMEN!

La pasintan 11an de februaro pli ol 20 esperantistoj vespermanĝis kune en ege agrabla etoso en la okcitana restoracio Jan Petit por adiaŭi nian kazaĥan amikon Darmen.

Li venis en Barcelonon kelkajn monatojn antaŭe por studi kaj tuj estiĝis nova membro de la kataluna esperanto movado; li ĉeestis la e-kursojn, la aranĝojn de la asocio kaj partoprenis en nia ĉiumarda konversacia rondo.

La vespermanĝo ne nur estis adiaŭo, ankaŭ taŭgis kiel bonvenigo al nia finna amikino Siru Laine kiu ek de tiu ĉi monato venis loĝi en nia urbo.

Kelkajn monatojn poste, la reĵurnalo Vilaweb publikigis leteron kiun Darmen sendis al Viktoro Solé. En ĝi, Darmen detalas, ke lia restado en Katalunio vekis lian engaĝigon agadi por la kazaĥa lingvo.

## ESPERANTO KIEL LABORLINGVO EN LA BARCELONA UNIVERSITATO

Kvar japanaj lingvistoj partoprenis la 21an de februaro en la labortago „Lingva teritorieco”, aranĝita de la Studgrupo pri Minacataj Lingvoj de la Barcelona Universitato. Por siaj prelegoj ili uzis la francan, la okcitanan, Esperanton kaj la katalunan. Eldoniĝos kvinlingva libro en tiuj 4 lingvoj kaj la japana.

Pasintvendrede, la 21-an de februaro, Goro Christoph Kimura prelegis en Esperanto dum la labortago pri „Lingva Teritorieco” ĉe la filologia fakultato de la Barcelona Universitato. Goro Kimura estas prestiĝa profesoro pri lingvistiko en la Sophia Universitato de Tokio kaj ankaŭ aktivulo por la lingvaj rajtoj de surdaj homoj kaj de pluraj agadoj ekologismaj, pacifisman kaj kontraŭmilitismaj en Japanio. La diskutforumo enkadriĝis en interkonsento por kunlaboro inter la kataluna universitato kaj kelkaj el la ĉefaj japanaj universitatoj. Oni devas elstarigi, ke la tri aliaj japanaj lingvistoj partoprenintaj ankaŭ elektis por siaj intervenoj lingvojn aliajn ol la propran kaj la anglan, precize: la francan, la okcitanan kaj la katalunan. Nu, ni trompas neniu dirante, ke profesoro Kimura, per la internacia lingvo, estis kiu pli flue kaj senafekte sin esprimis. Ni ankaŭ trompas neniu dirante, ke la

plimulto de la ĉeestintoj, kiuj plenigis la (por tiu okazo tro malgranda) „instruista ĉambro” estis esperantistoj.

En sia prelego, profesoro Kimura prezentis noveman vidpunkton pri la kapabloj de minoritataj aŭ minorigataj lingvoj dum situacio de kreskanta deterritoriiĝo. La japana lingvisto, fakulo en la studado de lingvaj pejzaĝoj en la urboj (kiuj ili spegulas sed ankaŭ kreas), klarigis unue la specialan lingvan situacion en la landlima regiono inter Germanio kaj Pollando. Li prenis la ekzemplon de Frankfurto ĉe Odoro – urbo en Brandenburgio, en la orienta parto de Germanio – kaj pola urbeto Słubice, trans la rivero Odoro. Fakte, ambaŭ urboj estis nur unu antaŭ la Dua Mondmilito. Nun, kaj ekde la fino de la Malvarma Milito, tre oftas la komercaj interŝanĝoj inter loĝantoj el ambaŭ flankoj de la rivero, kaj tio okazigis kuriozan dulingan pejzaĝon en la strataj inform-signoj kaj vendejaj reklamiloj... malgraŭ la germana iom superregas. Alivorte, la konata principo de teritorieco laŭ kiu al ĉiu teritorio apartenas nur unu lingvo, en la kazo de la landlimo inter Germanio kaj Pollando estas pli kaj pli nebula.

Due, Goro Kimura prezentis la aferon de la soraba, slava lingvo proksima al la pola kaj la ĉeĥa kiu ankoraŭ nun pluvivas en la germana regiono de Sorabio, malgraŭ ke kun lingvaj uzoj tre specifaj, similaj al tiuj de la okcitana: ĝia publika videbleco estas preskaŭ simbola kaj ĝi estas ekster kerna regiono pli parolata en kulturaj asocioj ol ene de familioj. Tio evidentiĝas, ke la principo de teritorieco rilate al la soraba lingvo estas, ĝenerale, tre malpreciza. Krom la procedo de anstataŭiĝo per la germana kiu la soraba historie suferas, nun ĝi estas ankaŭ minacata per la ĉeesto de la pola. Tamen, la esplorado de la japana lingvisto montras, ke lastatempe oni identigis kelkajn uzojn de la soraba kiel pontlingvo kun najbaraj slavaj popoloj. Precize, la turismaj oficejoj ambaŭflanke de la landlima regiono konsideras pli kaj pli la uzon de la soraba en ĝiaj materialoj, ĉar temas pri lingvo komprenata por la tiuregionaj lokanoj kaj por polaj aŭ ĉeĥaj vizitantoj. En la okazo, ke tiu uzo firmiĝus kaj disvastiĝus al aliaj sociaj areoj, ĝi povus doni novan impeton al la soraba lingvo.

La konkludo de profesoro Kimura estas tre esperiga por la estonto de lingvoj minoritataj aŭ minorigataj, ĉar oni devas pensi, ke multaj el ili troviĝas ĝuste en landlimaj teritorioj kaj, pro tio, ili havas la kapablon roli kiel pontlingvojn en mal-





samaj sektoroj de la ekonomia vivo de najbaraj komunumoj.

La prelego de Goro Kimura estis tuj-tradukita en la katalunan de esperantisto kaj okcitanisto Ferriol Macip. La diskutforumo lasis por la memoro plurajn anekdotojn kuriozajn por la esperantistaro. Ekzemple, kelkaj ĉeestintoj elstarigis je la fino la agrablan senson rekte kompreni la ironion simpatian kaj kutiman en prelegoj de la japana lingvisto, dum la cetero de la ĉeestintoj devis atendi kelkaj sekundoj, ĝis la traduko. Aliaj substrekis la „etan finan venkon”, kiu signifis en la mondo de la kataluna lingvistiko, ke unu el la ĉefaj nuntempaj japanaj lingvistoj, fakulo inter aliaj aferoj pri la emerĝa kaj plurfaka areo de la lingva justeco, elektis ĝuste la internacian helpan lingvon por prelegi ĉe ni. Ĉar, alie ol oni povus imagi, en filologiaj fakultatoj (ankoraŭ) ne estas kutima la ĉeesto de Esperanto kiel *lingua franca* por la scienca diskuto.

Kiel rezulto de la labortago, la Studgrupo pri Minacataj Lingvoj (GELA laŭ katalunaj sigloj) de la Barcelona Universitato eldonos kvinlingvan libron en la japana, Esperanto, kataluna, okcitana kaj franca.

Xavier Alcalde

## NOVA ESTRARO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

Ĝenerala asembleo de KEA okazis la 5an de aprilo. Krom raportojn kaj bilancojn pri la pasinta agado, oni aprovis unuanime la agadon kaj buĝeton por 2014, kaj plurajn proponojn de la ĉeestantoj.

Tiu asembleo ankaŭ vidis ŝanĝojn en la estraro, kiu ekde nun konsistas je Josep Franquesa kiel prezidanto, Carles Vela kiel vicprezidanto, Gemma Armadans kaj Xavier Alcalde kiel kunsekretarioj, Sebastià Ribes kiel kasisto, kaj Llibert Puig, Ramon Perera kaj Montserrat Franquesa estas voĉdonantoj.

## POEMOJ KAJ KANTOJ DE LA MONDO EN ESPERANTO EN LLAGOSTERA

La pasintan 25an de aprilo, por la tria sinsekva jaro, la insitucio por la lingva normaligo de la kataluna (Consorti per a la Normalització Lingüística) aranĝis en



urbo Llagostera la recitalo „Poemes del món” (Poemoj de la mondo). Partoprenis en la evento, prezidita de la urbestro, diverslandaj homoj loĝantaj en Katalunio, kiuj recitis poemojn sialingve dum kunulo tradukis ilin en la kataluna.

Nia eta esperanto-lernejo de Cassà de la Selva partoprenis por la dua sinsekva jaro. Dolors Godoy, la instruistino, recitis propran poemon. „Vin eble surprizigos, ke mi deklamu poemon en lingvo sen lando. Sed kiam Zamenhof kreis tiun lingvon, li faris kun la espero, ke ĝi estu utila por unuigi homojn el la tuta mondo, ke ni ĉiuj interkompreniĝu sen la neceso

alpreni alilandan lingvon kiel interkulturan komunikilon. Tial nia stelo estas verda kiel espero —jen kio signifas „Esperanto” — kaj ties kvin pintoj signifas kvin unuigintaj kontinentoj —jen nia espero— per unu sola lingvo, posedado de neniu ŝtato sed de la tuta Homaro: la lingvo de la paco kaj de la frateco”, prezente diris Dolors Godoy.

Akompanis ŝin tri lernantinoj kiuj sukcesis per kantado de „Ĉu vi volas danci?” de JoMo. La ĉeestantoj kunkantis ĝoje, kaj la sukceso estis tiel granda, ke la foto de ili bildigis artikolon pri la evento en la ĵurnalo El Punt-Avui.

## FULMLECIONOJ DE ESPERANTO FURORAS EN LA LIBROTAGO



La 23an de aprilo, okaze de la libro-tago, Kataluna Esperanto-Asocio starigis budojn en Sabadell kaj en Barcelono. Tiu de Barcelono estis starigita en La Rambla, samkiel dum pasintaj jaroj, sed ĉi-foje ĝi estis multoble pli sukcesa kaj fruktodona.

La ĉefa tasko de la budo estis informa. Ĝi proponis i.a. kelkminutan enkondukan kurson de Esperanto, okazinta plurfoje longe de la tago. Entute, ĉ. cent homoj gustumis Esperanton pere de la kelkminuta leciono. La fulmkurson pretigis kaj

enkondukis Viktoro Solé, ĝi estis amuza, tre pedagogia kaj forte vekis entuziasmon.

Deĵorantoj donacadis flugoflojn, ekzemplerojn de Kataluna Esperantisto, paĝomarkilojn dezeginitaj de Guillem Sevilla kaj disvendis librojn kaj t-ĉemizojn. La plej vendita libro estis *La Eta Princo* de Saint-Exupéry.

## 73A HISPANA KONGRESO KAJ 18A ANDALUZIA KONGRESO

En la bela andaluza urbo Arundo (Ronda) okazis samtempe la 18a Andaluzia kaj la 73a Hispana kongresoj. De la 1a ĝis la 4a de majo la 130 partoprenantoj el pli ol dek landoj ĝuis la buntan programon, kies du ĉefaj temoj estis instruado kaj muziko.

Kadre de la Konferenco pri Instruado de Esperanto spertaj instruistoj de la Internacia Lingvo, kiel Katalin Kováts, Rafael Mateos, Miguel Gutiérrez Adúriz, Lorenzo Noguero, José Salguero (Kani) kaj Eduardo Berdor, instruis, prelegis kaj debatis pri tiu ĉi temo. Malgraŭ la ĉeesto de tiel gravaj instruistoj la afero ne estis tiel kontentige fruktodona kiel antaŭvidite eble pro ĝia tro malfrua organizo. Persone, mi kontribuis per prelego pri mia helpilo Mansignado por Esperanto. Kadre de la kongreso Katalin Kováts okazigis sesion de la oficiala KER-ekzameno. Entute ekzameniĝis 16 homoj, preskaŭ duono el ili venis el la Kataluna Landaro.

La organizantoj de la kongreso invitis la partoprenantojn al koncerto de flamenka muziko en la urba Peña Flamenca (flamenka klubo), kie oni povis sperti tiun emociigan arton rekte el lokaj artistoj.

Ankaŭ okazis interesplena koncerto de al-andalusa muziko fare de marokaj profesiaj muzikistoj kaj en la lasta nokto estis duobla programo: en la unua parto la fama kantistino María Villalón kantis en la hispana, la portugala, la itala kaj eĉ en Esperanto, kaj finis la koncerton la okcitana kantisto JoMo, kiu, kiel kutime, dancigis eĉ la malplej dancemajn homojn.

Sendube la plej sukcesa programero estis Vivu la teatro! profesie gvidita de Miguel Fernández kaj Ana Manero en la impona urba teatro, kie dudeko da kongresanoj altnivele kantis, deklamis poemojn kaj aktorisis en amuzaj skeĉoj, el kiuj elstaris la monologoj de Miguel Gutiérrez Adúriz kaj Manuel Pancorbo, la flamenkaj kantoj de Miguel Fernández kaj la partopreno de Abel Montagut, kiu aktorece deklamis siajn tradukojn de poemoj de La taŭro (La pell de brau) fare de Salvador Espriu.

Inter bonaj etoso kaj vetero la komunaj manĝoj iĝis ankaŭ gravaj kaj interesplenaj programeroj kaj tio helpis la partoprenantaron sufiĉe bone alkitimiĝi al la loka malfido al la oficiala tempo.

Viktoro Solé

## BELETRA KONKURSO RAMON FERNÁNDEZ JURADO

La 7-an de junio okazis en la urbo Castelldefels la transdono de premioj de la nova Concurs Literari Ramon Fernández Jurado. La organizanto estas Collectiu RFJ, kies celo estas, ke la ĉefa biblioteko de la urbo rehavu la nomon de Ramon Fernández Jurado, nomon, kiun havis tiu biblioteko dum 27 jaroj, ekde sia aperigo ĝis

antaŭ du jaroj, kiam la nova dekstrema kaj hispanisma urbestraro ŝanĝis ĝin.

La partoprenantoj rajtis sendi tekstojn kaj poemojn en la kataluna, la hispana kaj en Esperanto, ĉar Ramon Fernández Jurado estis tre aktiva esperantisto.

La solenaĵo, kiu havis muzikan akompanion fare de la lokaj grupoj Assai kaj Coral Ventijol, havis centon da ĉeestantoj, kaj kiel premioj, oni liveris artaĵojn donacitajn de tieaj artistoj. La unuan prozan premion en la kataluna aŭ en la hispana gajnis la nobakita esperantistino Paquita García per kortuŝa rakonto pri Castelldefels, Esperanto kaj Ramon Fernández Jurado titolita *L'esperanto, el gran desconegut*. La juĝantoj de la esperantaj verkoj, Montserrat Franquesa kaj Martí Guerrero, donis la unuan prozan premion al nia samasocianino Dolors Godoy per la novelo titolita *En kiu momento Castelldefels elmergiĝis*. La dua premio el tiu kategorio estis por Jesús González kaj sia memorrakonto *Ĉiam restos al ni... Castelldefels*. Poezie, la unua premio estis por poemo dediĉita al Ramon Fernández Jurado titolita *Vere granda kataluno* fare de nia samasociano Ferriol Macip, kaj la dua premio por la poemo Castelldefels, la maro de Jordi Puig, ankaŭ membro de KEA. Ĉiuj nepremiitaj partoprenantoj, kiuj ĉeestis la solenaĵon, ankaŭ ricevis donacon.

Nome de Kataluna Esperanto-Asocio mi gratulas la organizan teamon de Collectiu RFJ kaj kuraĝigas ĝin daŭrigi siajn klopodojn kaj tiun novan beletran konkurson, kiu fakte estas la nura nialande, kiu akceptas esperantajn tekstojn.

Viktoro Solé



Ankaŭ okazis interesplena koncerto de andalusina muziko fare de marokaj profesiaj muzikistoj

## LA ĈUVAŜA, EKZEMPLO DE LINGVA ANSTATAŬIĜO EN LA RUSA FEDERACIO

Mi havis la bonŝancon partopreni la du prelegojn de Hektor Alòs lastatempe en Barcelono pri la ĉuvaŝa lingvo La unua okazis en la fakultato pri filologio de la Universitato de Barcelono kaj en ĝi ĉeestis elstaraj socilingvistoj kiaj Francisc Xavier Vila aŭ Albert Bastardes. La diskuto, tre akademia, pritraktis i.a. la diversajn metodologiajn aspektojn de la esploro. Tiu esploro elstaras pro la fakto, ke temas pri ekzempla paradigmo de lingva anstataŭiĝo. La lingvo daŭre vivas en kampara medio kaj ĝi perdiĝas laŭ la





reliefiĝis la ideologion, ofte nekonscian, ligitan al la superregantaj lingvoj. „Imperiismo unue konkeras la menson”, li diris, kaj ĉiuj konsentis.

La sekva debato pritraktis aliajn temojn kun pasio kaj evidentigis sanan kaj plurlan vidpunktaron. Menciindas la dubligo de filmoj, la rilato de Esperanto kaj lingva diverseco, la diversaj manieroj por kompreni la lingvan justecon aŭ la estonto de aliaj minoritataj lingvoj de Iberio, kiel ekzemple la aragona.

En la aranĝo oni menciis honorige la profesoron Jaume Sastre, kiu ĝuste tiutage ĉesis 40-tagan malsatstrikon por la katalunlingva instruado en Balearoj. Inter la publiko estis elstaraj fakuloj kiaj Teresa Marbà aŭ Montserrat Franquesa. Aliflanke, iom antaŭ la ronda tablo organizita de KEA, Vilaweb intervjuis Juan Carlos Moreno Cabrera.

Xavier Alcalde

## MICHELE GAZZOLA PRI LINGVA JUSTECO EN EŬROPA UNIO

La tria, kaj lasta, sesio de prelegserioj pri minoritataj lingvoj kaj lingvaj imperiismoj aranĝata de Kataluna Esperanto-Asocio, okazis la 8an de julio kaj proponis la prelegon de la profesoro Michele Gazzola, kiu analizis kio estas lingva justeco en Eŭropa Unio kaj kiel ĝi estas mezurebla.

La profesoro Gazzola prelegis ankaŭ en Espai Vilaweb kaj Vilaweb TV filmis kaj elsendis la tutan prelegon, kaj ĝi estas daŭre spektebla sur la retejo.

Gazzola laboras en la Universitato Humboldt de Berlino kie li esploras pri lingva politiko en EU kaj pri justeco rilatanta lingvoj. Michele Gazzola estas unu el la plej gravaj eŭropaj fakuloj pri tiu temo.

## HISTORIO DE ESPERANTO EN CATALUNYA RÀDIO

La historiisto Dani Cortijo prezentis Esperanton pasintjaŭde, la 24an de julio, en la programo 8 Dies a la Setmana (8 tagojn semajne) kiun elsendas Catalunya Ràdio, la ĉefa publika radio de Katalunio. En tiu programo Cortijo gvidas historian sekcion kies celo estas malkovrigi al aŭskultantoj preteratentatajn faktojn kaj aferojn.

diversaj generacioj. T.e., pluraj gepatroj kiuj parolas la ĉuvaŝan kun siaj gepatroj alparolas la rusan al la gefiloj.

La dua prelego okazis en ejo Vilaweb, ĝin aranĝis Kataluna Esperanto-Asocio kaj inaŭguris serion da prelegoj kie ankaŭ partoprenos Jordi Solé i Camardons, Lluís de Yzaguirre, Juan Carlos Moreno Cabrera aŭ Michele Gazzola. En sekvaj sesioj de tiu serio oni pritraktos diversajn temojn kiuj rilatas al lingva imperiismo kaj lingva justeco.

La prelego en ejo Vilaweb, kie partoprenis kvindek-kelko da homoj, pritraktis la staton de la ĉuvaŝa kadre de la lingva politiko en Rusio. Tiel, la preleganto prezentis la diversajn eraojn de la lingva politiko en Rusio dum la 20a jarcento kaj la situacion de la diversaj teritoriaj lingvoj. En la dua parto, la preleganto proponis panoramon pri la nuntempa uzado de la ĉuvaŝa. La sekva debato, kie partoprenis elstaraj fakuloj kiaj Miquel Cabal, pritraktis ĉefe la eblecojn revivigi la lingvon en la estonteco.

Alos reliefiĝis la ĝeneralan malkonon de la eblecoj de dulingvismo kaj de plurlingvismo en socio kiu, sen aliro al internaciaj eldonaĵoj, pluraj gepatroj daŭre pensas ke paroli lingvon okazigas misparolon de iu alia. Kurioze, entuziasma anaro kiu defendas la ĉuvaŝan konsistas ĉefe el ĉuvaŝaj esperantistoj kiuj, konante la teoriojn pri lingva ekologio kaj lingva daŭripovo, decidis aktive agadi kreante nuntempe promesplenajn iniciatojn.

Xavier Alcalde

## RONDA TABLO PRI LINGVAJ IMPERIISMOJ

Tri lingvistoj engaĝiĝintaj. Tiel prezentis Ferriol Macip, ceremoniestro, la prelegontojn Lluís de Yzaguirre, Jordi Solé i Camardons kaj Juan Carlos Moreno Cabrera, antaŭ kvindeko da homoj kiuj ree plenigis la salonon de Vilaweb. Temis pri la dua sesio de la prelegserio pri minoritataj lingvoj kaj lingvaj imperiismoj aranĝata ĉi-jare de Kataluna Esperanto-Asocio.

Kvankam la tri lingvistoj havis similajn vidpunktojn rilate al la demandoj proponitaj, estis rimarkeblaj kelkaj nuancoj. Tiel, ekzemple, el leĝa vidpunkto, De Yzaguirre asertis, ke en eventuala kataluna respubliko neniu oficiala lingvo estos necesa, sed kompreno de la kataluna ja estu deviga por esti civitano. Siaflanke, Moreno Cabrera proponis, ke la kataluna estu la sola oficiala lingvo kiel defendo de lingva imperiismo, rilatanta la uzon de la hispana lingvo, tiu nuntempan kaj tiun post sendependiĝo de la lando. Meza estis la vidpunkto de Solé i Camardons, kiu asertis, ke la kataluna devos esti la sola necesa lingvo, dum la aliaj estu utilaj lingvoj en kunteksto kie, lingva politiko, estos pli grava afero ol nuntempe estas.

Aliflanke, la partoprenantoj forte malaprobis la rolon de la angla, evidentigante la maljuston de la fakto, ke kelkaj landoj favoras pro la nuntempa „socilingvisma ordo”, laŭ difinis Solé i Camardons. Ankaŭ De Yzaguirre insistis sur la stranga supereco kiun oni supozas al unulingvuloj ol al la plurlingvanoj. Sed la plej frapanta diskurso estis tiu de Moreno Cabrera, kiu

Cortijo ĉefe parolis pri la historio de la internacia lingvo, pri ties persekuto kaj pri ideologiaj aspektoj. Kelkaj radiaŭskultantoj telefonvokis kaj parolis esperante kun la esperantista historiisto.

## KURSFINO EN BARCELONO

La lernantoj en la barcelonaj kursoj de Kataluna Esperanto-Asocio festis pasintmarde la kursfinon 2013-2014. Dum tiu lasta lernotago, la grupo de komencantoj, gvidata de Viktoro Solé, kaj tiu de progresantoj, gvidata de Xosé Conde, kuniĝis en lasta sesio kie ili kunmanĝis kaj kuntrinkis en la internacia lingvo.

Ili poste iris al la trinkejo de l' CAT por renkonti la konversacian rondon kiu ĉiumarde tie kuniĝas. Ili formaniĝis la restantajn kukojn kaj dolĉaĵojn kaj praktikis la lernitan Esperanton. Ni esperas, ke ĉi-somere ĉiuj havos la okazon esperantumi internacie.

La konversacia rondo daŭre renkontiĝas ĉiumarde.

## SIRU LAINE INTERVJUITA DE EL PERIÓDICO

Pasintdimanĉe, la ĵurnalo El Periódico de Catalunya publikigis intervjuon de Siru Laine, 27-jara finna lingvisto, kiu translokiĝis al Barcelono antaŭ kelkaj monatoj por labori en multnacia tradukkompanio.

Siru partoprenas ĉiumarde en niaj esperantaj konversaciaj rondoj en la trinkejo

El Bar del CAT. Ŝi kapablas konversacii almenaŭ en dudek lingvoj, kaj ŝia pasio estas lingvistiko.

En tiu intervjuo, Laine parolas pri Esperanto kaj pri la granda socia agado kiun ŝi havas per la internacia lingvo. Tamen, elstarindas ŝia defendo al plurlingvismo kaj al minorigitaj lingvoj kiuj „estas tiel gravaj kiel la plej parolataj kaj malfermas pli da pordoj ol oni povas imagi”.

<http://www.elperiodico.cat/ca/noticias/societat/siru-laine-una-llengua-minoritaria-tobre-mes-portes-del-que-pensas-3337188>

## SOMERA ESPERANTO-STUDADO (NITRA, SLOVAKIO)

De la 12a ĝis la 20a de julio okazis en la slovakia urbo Nitra la Somera Esperanto-Studado organizita de Edukado@Interreto (E@I). En ĝi partoprenis 248 homoj el 29 landoj, inter ili 12 katalunoj, sufiĉe granda grupo, kiu baldaŭ konatiĝis per la karesnoma esprimo „la kataluna mafio”.

Kiel kutime la SESanoj matene partoprenis la kursojn organizitajn laŭ 6 niveloj (de A1 ĝis C2). La ĉi-jara novaĵo estis la interesega kurso pri esperanta literaturo kaj verkado gvidita de Jorge Camacho kaj Nicola Ruggiero. Posttagmeze oni povis aŭ ekskursi aŭ ĉeesti prelegojn pri la plej variaj temoj. Nokte okazis koncertoj. Ĉi-jare koncertis JoMo, Kimo, la ĉeĥa grupo No problem (kiu kantis ankaŭ esperante), Martin Wiese kaj Kaŝi, la germana blindulo, kiu unuafoje prezentis sukcesege siajn kantojn kadre de oficiala koncerto.



En Somera Esperanto-Studado

Kiel diris Peter Balász, la ĉefa organizanto de la aranĝo: „nova stelulo en Esperantujo aperis”. Kadre de la aranĝo okazis KER-ekzameno kun deko da ekzamenintoj.

En la Internacia vespero, la partopreno de katalunoj estis rimarkinda: Noa Aymami kaj Martí Solé (kun aliaj geamikoj) bele prezentis kanton, Joan Clos brile aktoris, ankaŭ brile mimis Martí en la prezentado de monologo de Viktoro kaj Maria Dolores Godoy kore deklamis unu el siaj poemoj.

Menciindas, ke en tiu aranĝo partoprenis unuafoje Teresa Marbà kaj Paquita García, kiuj, en klara monstro, ke la esperanta







mondo bone zorgas pri ĉiuj, ricevis sian atestilon skribitan en brajlo.

## LINGVA JUSTECO: ĈEFA TEMO DE LA INTERNACIISMA RENKONTIĜO

La lingva justeco rolis kiel ĉefa temo de la 11a Internaciisma Renkontiĝo, okazinta en l'Arboç inter la 5a kaj la 7a de septembro. Partoprenis sepdeko da homoj venintaj ĉefe el la Kataluna Landaro, sed ankaŭ el Okcitanio, Piemonto, Madrido kaj eĉ Aŭstralio.



En la Asocia Foiro de la Kataluna Landaro

Partoprenintoj sekvis prelegojn kaj debatojn pri lingva justeco. Krome, la partopreno de la asocio de amikoj de Vikipedio alportis vikipedian sesion kaj sciigis onin kiel labori por kunhavi sciojn. La aranĝo ankaŭ enprogramigis kunsidon de la esperantista sekcio de Nacia Kataluna Asembleo —ĉefa socia asocio laboranta por sendependenco de la lando—, prezenton de la Muzeo de Esperanto de Subirats, sesion pri internaciaj esperanto-aranĝoj kaj lingvajn dubsolvajn sesiojn. Aliflanke, la Renkontiĝo proponis enkondukan kurson de Esperanto, laŭ tri sesioj duhoraj, en kiu partoprenis kvindeko da novuloj.

Plej nombraj estis la distraj programeroj. Festigis la partoprenantojn kelkaj folkloraj urbaj grupoj, la atelieroj pri internaciaj popoldancoj, la improvizaj kantoj en Esperanto kaj la koncertoj de Els Llunàtics, No em Toques kaj JoMo. La evento finiĝis per kultura urba vizito kaj komuna frateca tagmanĝo.

Organizis Kataluna Esperanto-Asocio kune kun Ateneu Arbocenc. Krome, la Internaciisma Renkontiĝo koincidis ĉi-jare kun la Iberia Renkontiĝo, kiun organizas alternativa ĉiun jaron la esperanto-asocioj portugala, hispana kaj kataluna.

## EN LA ASOCIA FOIRO DE LA KATALUNA LANDARO

Kataluna Esperanto-Asocio starigis buĉdon la pasintan 11an de septembro en la Asocia Foiro de la Kataluna Landaro oka-

ze de la nacia tago de Katalunio. La foiro celas grupigi ĉiujn asociojn de la lando kaj en ĝi okazas prelegoj, koncertoj kaj ĉiuspecaj aranĝoj. Pluraj personoj vizitis la foiron, ĉefe matene.

La ĉefa celo de nia ĉeesto en la kataluna asocia medio, estas informi pri la komencontaj kursoj de Esperanto. Sed la budo ankaŭ proponis fulmlecionojn de la internacia lingvo, vidinte la sukcesan sperton dum la librotago pasintaprile. Temas pri kelkminuta enkonduka kurso de Esperanto, okazinta plurfoje longe de la tago. Ĝin pretigis kaj enkondukis Viktoro Solé, ĝi estas amuza, tre pedagogia kaj forte vekis entuziasmon.

## EN LA JARKUNVENO DE ĈINAJ E-KOMERCISTOJ

La 1an kaj la 2an de novembro, nia samasocio Josep Franquesa Gòdia partoprenis la 8an Jarkunvenon de Ĉinaj E-komercistoj en urbo Tianjin. Franquesa, filo de nia prezidanto, profitis la eventon por fari komercajn kontaktojn pere de la internacia lingvo.

La evento kunigis kvardekon da esperantistoj diverslandaj kiuj interŝanĝis spertojn, subskribis kunlaborajn komercprotokolojn kaj pluraj aliaj programeroj. Ĉinaj esperanto-komercistoj aktive uzas la internacian lingvon en siaj komercaj aferoj kaj engaĝigas tutmondajn entreprenistojn.

## VIKIPEDIA ATELIERO

La pasintan 28an de septembro okazis praktika ateliero pri Vikipedio kunorganizita de Kataluna Esperanto-Asocio kaj de Amical Wikimedia. Temis pri la daŭrigo de la prelego okazinta pasintseptembre en la renkontiĝo de L'Arboç. Tiel, deko da partoprenantoj povis gustumi la facilajn de la nova virtuala redaktilo, kaj en la kataluna kaj en la esperanta versioj de Vikipedio. Por la jaro 2015 oni antaŭvidas pliajn kunarangojn de ambaŭ asocioj kiuj inkluzivus atelierojn, vikimaratonojn kaj eĉ ambician projekton por plibonigi la priesperantajn artikolojn de la katalunlingva Vikipedio. Menciindas, ke ekde la renkontiĝo en L'Arboç nia nacilingva vikipedio riĉiĝis per kvindek da artikoloj pri elstaraj esperantistoj kaj aperis trideko da mencioj al la esperantisteco de kelkaj gravuloj kiaj Reinhard Selten aŭ Jules Verne. Ankaŭ kreskis la artikoloj pri kataluna kulturo en Esperanto.

## FORPASIS GABRIEL MORA I ARANA

Mardon la 25an de novembro forpasis la poeto kaj esperantisto Gabriel Mora i Arana, 89-jaraĝa. Li gajnis diversajn poeziajn premiojn en la Floraj Ludoj de Barcelona (prestiĝega katalunlingva poezia konkurso) kie li atingis la titolon de Florluda Majstro.

En Esperanto li estis unu el la starigintoj de la Internaciaj Floraj Ludoj kaj el siaj verkoj elstaras la tradukoj de la poemaro *Tombejo de Sinera* de Salvador Espriu kaj

de la poemo „Vortoj por la paco” de Miquel Martí i Pol. Liaj verkoj troviĝas en la *Esperanta Antologio. Poemoj 1887-1981*.

La pasintan 21an de marto li estis unu el la protagonistoj de la Monda Tago de la Poezio en Manresa kaj la societoj Ōnium Bages kaj la biblioteko Del Casino omaĝis lin kaj aranĝis ekspozicion pri li.

Kataluna Esperanto-Asocio kore bedaŭras la forpason de granda asociano kaj granda homo, kaj esprimas sian kondondencon al liaj familianoj kaj amikoj.

## NOVA LIBRO PREZENTITA EN LA BARCELONA ZAMFESTO

Pasintlunde, la 15an de decembro, ni festis la 127an esperanto-tagon. Tiukadre ni prezentis en la librejo Documenta de Barcelono la lastan publikaĵon de KEA, la *Mal-*

*granda proverbaro kataluna-Esperanto* de Pedro M Martín Burutxaga. Krom la aŭtoro, prezentis la verkon la paremiologo Víctor Pàmies, kiu verkis la antaŭparolon de la libro.

Dum la aranĝo ni memorigis la poeton Gabriel Mora i Arana, forpasinta la 25an de novembro, kaj ni prezentis tiun Verkami-projekton: BAPN, ni konservu la memoron de Esperanto en Katalunio.

Ni estas ege kotentaj pro la eko de la kampanjo, pro la kvanto da donacoj kaj pro ties disvastigado, nacie kaj internacie. Krome, elstarigas la projekton la retejo de la Kultura Instituto de Barcelono kaj la reĵurnalo Vilaweb.

Sed „ ankoraŭ la ezoko ne estas sur la hoko”, kaj ĝis januaro ni ne scios ĉu ni povos savi la Biblioteko-Arĥivon Petro Nuez (BAPN). Bv. helpi nin. Koran dankon!




Pedro M. Martín Burutxaga

---

**Petit refranyer català-esperanto**  
**Malgranda proverbaro kataluna-Esperanto**

---

Pròleg de Victor Pàmies i Riudor  
Antaŭparolo de André Cherpillod



**ESPERANTO\* CAT**  
\*Asociació Catalana d'Esperanto/Kataluna Esperanto-Asocio

### MALGRANDA PROVERBARO KATALUNA-ESPERANTO

**de Pedro M. Martín Burutxaga**

Proverboj estas unu el la plej interesaj elmontroj de popola kulturo. Tra ili ni ricevas hodiaŭ la spertojn akumulitajn de antaŭaj generacioj. Iliaj mallongaj kaj trafaj frazoj resumas en malmultaj vortoj la konojn de jarcentoj.

En ĉi tiu kolekto vi trovos grandan nombron da esperantaj proverboj, vi povos ilin kompari kun iliaj ekvivalentoj en la kataluna kaj vi vidos kiel tiuj etaj perloj de saĝeco havas komunan universalan bazon.

### KOMENCIĜIS LA PERADSERVO POR 2015

Komenciĝis la peradservo de KEA por aboni revuojn kaj pagi kotizojn al asocioj aŭ al esperantaj eventoj de la tuta planedo por la jaro 2015.

Se vi deziras, ke ni peru ion por vi, bonvolu konsulti la retpaĝon [victorsole.com/esperanto/perado/](http://victorsole.com/esperanto/perado/) kaj klarigi kiujn publikaĵojn vi volus aboni, kaj al kiuj asocioj vi volus aliĝi. Nia peranto, Viktoro Solé, plezure helpos vin.